

# LA BELA MONDO

---

PAGO POR TURISMO, BANOJ, TRAFIKO KAJ SEMAJNFINO + NUMERO 3 + HEROLDO DE ESPERANTO, N-RO 9 (662)

---

# Kortrijk. Urbo de la 3-a Flandra Kongreso de Esperanto.

La urbon Kortrijk (france: Courtrai), je 27 kilometroj de Yper, certe konas ĉiuj niaj legantoj, kiuj dum la mondmilito staris en la batakampoj de Flandrujo. Dubinde estas, ĉu ekzistas regimentoj kiuj ne trairis ĝiajn stratojn; en ĝia tero dormas viktimoj el la kvin kontinentoj; Anglujo, Francujo, Germanujo,

Efektive en Belglando ĝi estas la sola urbo, kiu oficiale donas jaran subvencion al Esperanto-grupo; same la kongreson ĝi promesis subteni.

Do, estas memkompreneble ke la lokaj samideanoj ege deziras amasan partoprenon.

La belga fervoj-administracio konsentas 35% da rabato, kaj la komitato zorgas por tre malmultekosta restado.

Por inde malfermi la kongreson, la programo mencias, sabate vespere, sonorilarkoncerton kun akompano de teabaj trumpetoj. Estas tiaj noktkoncertoj kiuj somere allogas tiom da alilandanoj al Bruĝo kaj Mehleno. Dimanĉmatene okazos diservo kun Esperanta prediko.



Kortrijk. — Parta vido de la Granda Placo.

Novlando (New-Ffoundland) tie starigis monumentojn je memoro de siaj infanoj.

La urbo Kortrijk estas tre antikva. Ĝi estas iama kelto—romana kolonio, kuŝanta ĉe krucejo de la ŝoseo Aardenburg—Tournaj kaj la rivero Leie.

Ekde la komenco de sia historio, Kortrijk konis la terurecon de okupado per armeoj de plej diversaj princoj kaj reĝoj.

Komence de la mezepoko, kaj eble eĉ pli frue, la bordanoj de la rivero Leie rimarkis ke ĝia akvo posedas specialajn kvalitojn por ruadi la lino. Tiel ekestis ĉirkaŭ Kortrijk prospera industrio, la ruado de lino, kies tekniko, jam de jarcentoj, estas transdonata de patro al filo.

Ne nur la lokan rikolton oni ruadis, sed baldaŭ venis lino ankaŭ el plej malproksimaj landoj.

Ankoraŭ nun venas grandaj kvantoj da lino el Francujo, Nederlando, la Baltaj Ŝtatoj kaj eĉ Sovet-Ruslando. Nur kvarono de la lino ruata estas enlanda.

De marto ĝis septembro, la Leie aspektas kiel ora rubando: La Ora Rivero ĝin nomas la britoj. Estas la ruada sezono.

Kruda lino estas pajlo enhavanta la fibrojn de lino. La ruado celas forigi la gluaĵon kaj disigi la fibrojn de la pajlo. Por tio oni metas la lino en kestegojn, poste puŝatajn en la riveron, kie ili restas pli-malpli longe laŭ la temperaturo de la akvo. Ĝis nun oni ne sukcesis trovi metodon kemian, kiu egalas ruadon en la Leie.

Estis feliĉa tempo, kiam prosperis komerco kaj industrio de lino. En la Kortrijk'a regiono la popoldenseco atingas 515 personojn por kvadrata kilometro, dum por la tuta lando ĝi atingas nur 260.


La valoro de la linproduktoj atingis dum 1928 1 miliardon 25 milionojn da frankoj. Malfeliĉe la monda ekonomia katastrofo ankaŭ ege trafis la lin-industrion.

El la brila periodo de la komunuma kaj princa Flandrolando, Kortrijk konservas multajn menciindajn konstruaĵojn. En ĉiu strato troviĝas privata domo, kaj ĉiuj placoj montras publikajn konstruaĵojn, kiujn oni povas klasigi inter la konstruaj juveloj de la lando.

Krome, bulvaroj kaj stratoj plantitaj per arboj plej diversspecaj, parkoj kaj floraj ĝardenetoj donas al la urbo tute specialan festaspekton, kiu impresas ĝoje kaj intense.

En tiu urbo, kie antaŭ kvin jaroj Esperanto-movado ne ekzistis, okazos je Pentekosto 1932 (14/15/16-an de majo) la tria Flandra Kongreso de Esperanto.

Pro speciala kaŭzo Kortrijk meritas nian atenton.



Kortrijk.  
La lamaj draphaloj.